

# Kronologia biografio kaj verkaro de Hector Hodler

(Kun biografiaj aldonoj pri la vivo kaj verko de Ferdinand Hodler)

De Andreas Künzli

Jaro	Okazaĵo
1887	Hector Hodler naskiĝas la 1an de oktobro en Ĝenevo, Svislando, kiel filo de la pentristo Ferdinand Holder kaj de Augustine Dupin. <i>En julio en Varsovio (eksa Pola Reĝlando, Ruslanda Imperio) estas publikigita la Lingvo Internacia (Esperanto) de d-ro L.L. Zamenhof. Ferdinand Hodler ekspozicias en Berno sesdek pentraĵojn.</i>
1888-89	Ferdinand Hodler kreas la pentraĵojn pri ‚Patrino kaj infano‘ (kiu montras Hector Hodler kaj Augustine Dupin). Al tiu unua ciklo apartenas la pentraĵoj <i>Hector sidanta, Hector dum la matenmanĝo, Patrino ludanta kun infano</i> (en la lavejo), <i>La matenmanĝo kaj Patrino kun infano en la ĝardeno.</i> <i>La 6an de majo 1888 Ferdinand Hodler oficiale agnoskas sian filon. En 1889 li edziĝas al Bertha Stucki (divorco en 1891). Ferdinand Hodler pentras ‚La Nokton‘, per kiu li famiĝas internacie.</i>
1892	<i>Ferdinand Hodler membriĝas ĉe la rozkrucistoj.</i>
1893-95	Ferdinand Hodler pentras la duan ciklon ‚Hector Hodler kiel knabo‘, kiu ampleksas la trilogion <i>La elektito, Preĝo</i> aŭ <i>Alpreĝado kaj Ravita</i> aŭ <i>Ĉarmata knabo</i> . Hector pozas kiel modelo por tiuj bildoj.
1894	<i>Ferdinand Hodler konatiĝas kun Berthe Jacques (edziĝo en 1898). La ‚Elektito‘ estas prezentita en Parizo.</i>
1894-95	Hector ekvizitas la bazan lernejon. Li servas kiel modelo por <i>Alpreĝado, Ĉarmata knabo kaj Knabo kun branĉoj</i>
1897	<i>Ferdinand Hodler gajnas la konkurson por la pentrado de ‚Marignano‘ en la historia muzeo de Zuriko.</i> <i>‚Nokto‘ ricevas en Munkeno kadre de la VIIa Internacia Artekspozicio la unuan Grandan Ormedalon.</i>
1897-1906	Hector loĝas ĉe la patrino, Augustine Dupin ĉe rue des Vollandes 9, Eaux-Vives, Ĝenevo)
1898	Hector pozas kiel modelo por ‚ <i>Knabo ĉe la rivereto</i> ‘. <i>Ferdinand Hodler edziĝas al Berthe Jacques.</i>
1900	Hector ekvizitas la gimnazion (Collège de Genève, klasika sekcio). <i>Hodler fariĝas membro de la Berlina, Viena kaj Munkena Secesioj.</i>
1901	Hector pozas kiel modelo por ‚ <i>La printempo</i> ‘. En tiu tempo Ferdinand Hodler desegnas la nudan filon en ‚ <i>Iranta junulo</i> ‘, ‚ <i>Junulo ĉe la rivero</i> ‘ kaj ‚ <i>Staranta junulo</i> ‘. <i>La registaro de la berna kantono aĉetas kontraŭ 25'000 frankoj kvar hodlerajn pentraĵojn: ‚La Nokto‘, ‚La senluziigitaj animoj‘, ‚Eŭritmio‘ kaj ‚Tago‘.</i>
1901-6	La tria ciklo, por kiu Hector Hodler pozadas, konsistas el la pentraĵoj <i>Printempo, Rigardo en la senfinon kaj Junulo admirata de la virino.</i>
1903	Kun sia lerneja amiko Edmond Privat Hector lernas Esperanton, kunfondas la Klubon de Junaj E-istoj de Ĝenevo kaj eldonas la gazeton

- 1905<sup>1</sup> ,Juna Esperantisto' (kiu aperis ĝis 1909).  
Hector Hodler fariĝas sekretario de la ĝeneva Esperanto-grupo. Lia traduko de ,Paŭlo kaj Virginio' de Jacques Henri Bernardin de Saint-Pierre aperas kiel literatura aldono de la revuo ,Lingvo Internacia' kaj kiel aparta broŝuro.
- 1906 Okaze de festo en la gimnazio Hector ludas la rolon de Jean Calvin.  
Hector Hodler kaj Edmond Privat organizas la 2an Universalan Kongreson de Esperanto en Ĝenevo (Svislando) kaj akceptas d-ron L.L. Zamenhof kiel gaston.  
Fine de la jaro Hector Hodler aĉetas la gazeton ,Esperanto' de Paul Berthelot.  
Antaŭ la abiturientiĝo Hector decidas rezigni pri la studado.  
*Lia patro Ferdinand alvokas lin lerni la pentroarton.*  
Hector Hodler verkas la romanon ,Les prolétaires', kiu estas influita de Emile Zola, ampleksas mil paĝojn kaj kiu restas nepublikigita.  
Augustine Dupin kaj Hector Hodler translokiĝas en loĝejon ĉe la stratadreso rue de la Scie 9, Eaux-Vives, Ĝenevo.
- 1907 La unua numero de la gazeto ,Esperanto' sub la redaktado de Hector Hodler aperas la 12an de februaro. (Hector Hodler restas ĝia posedanto ĝis 1920.)  
Aperas liaj tradukoj de ,Legendo de S. Juliano' de G. Flaubert kaj ,Sabla homo' de E.T.A. Hoffmann.  
Liajn verkaĵojn li kutimas subskribi per la pseŭdonomo Andreas Remy.  
La 20-jara Hector Hodler partoprenas en la 3a Universala Kongreso de Esperanto en Kembriĝo (Britio), kie li prezidas la fakkunvenon pri Esperanto-oficejoj kaj konsuloj.  
La 14an de decembro Hector Hodler estas oficiale registrita en la origina komunumo de la patro, Gurzelen en la berna kantono.  
*Ferdinand Hodler, La ekmarŝon de la studentoj de Jena al la liberiga milito de 1813' por la universitato de la urbo Jena en Turingio.*
- 1908 La 28an de aprilo, Hector Hodler fondas kun amikoj en Ĝenevo Universalan Esperanto-Asocion (UEA). La unua oficejo troviĝas ĉe la strato Bovy-Lysberg 8 en Ĝenevo, kie Hector Hodler kunlaboras kun René de Saussure, kiu vigle ekinteresiĝas pri Esperanto. Hodler fariĝis la unua (ĝenerala) direktoro kaj vicprezidanto de UEA kaj redaktoro de la ,Oficiala Bulteno de UEA' (kunlabore kun la sekretario Hans Jakob).  
Fonda prezidanto estas la brito Harold Bolingbroke Mudie (+1916).  
Hector Hodler partoprenas en la 4a Universala Kongreso de Esperanto en Dresdeno (Germanio), kie li prezentas en parolado la celojn kaj signifon de UEA.  
En Parizo aperas lia fabelo ,Kristnaska nokto'.  
*Ferdinand Hodler konatiĝas kun Valentine Godé-Darel. Li fariĝas ĉefprezidanto de la Svisa Societo de la pentristoj, skulptistoj kaj arkitektoj.*
- 1909 Hector Hodler partoprenas en la 5a Universala Kongreso de Esperanto en Barcelono (Katalunio/Hispanio).  
UEA translokiĝas al sidejo ĉe la strato rue de la Bourse 10 (Borsa strato), kie ĝi restas ĝis 1919.  
En Ĝenevo aperas broŝurforme ,La verko de Zamenhof', parolado farita

<sup>1</sup> La indiko de Brüschweiler, ke Hector Hodler partoprenis en 1905 la 1an Universalan Kongreson de Esperanto en Bulonjo-ĉe-maro, estas eraro. Strange, ke aliflanke li ne menciis la alijarajn kongrespartoprenojn de Hodler, kiuj estas bone dokumentitaj.

- de Hector Hodler ĉe la Ĝenevaj esperantistaj grupoj, okaze de la Zamenhofa jubileo.
- 1910 En novembro lia patrino Augustine Dupin forpasas.  
Hector Hodler partoprenas en la 1a Kongreso de UEA, kiu estas okazigita en Augsburg (Germanio).  
Artikolo-raporto pri la socia signifo de UEA kaj la diferenco inter internaciismo kaj esperantismo.  
*Okaze de la inaŭguro de la nova artodomo de Zuriko, Ferdinand Hodler kreas la grandan murpentraĵon por la ŝtupara koridoro. Li fariĝas honora doktoro de la bazela universitato.*
- 1911 Hector Hodler partoprenas en la 2a Kongreso de UEA, kiu okazas kadre de la 7a Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno (Belgio).  
Aperas la broŝuro ‚Esperantismo‘ de Hector Hodler (en la lingvoj angla, franca kaj germana).
- 1911-12 Hector Hodler pozas kiel modelo por la pentraĵo *Unuanimeco* por la hanovra urbodomo kaj por *Pentraĵo de Hector Hodler*. Kelkajn portretojn li pentras pri si mem.  
Hector Hodler malsaniĝas je la ftizo (tuberkulozo) kaj translokiĝas al Leysin por la kuracado. De tempo al tempo li reaperas en Ĝenevo.  
*En 1911 Ferdinand Hodler pentras la bildojn por la svisaj monbiletoj, ekde 1912 sekvas tuta serio de memportretoj kaj bildoj de pejzaĝoj.*
- 1912 Hector Hodler partoprenas en la 3a Kongreso de UEA, kiu estas okazigita kadre de la 8a Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo (Aŭstrujo-Hungarujo).  
Hector Hodler aperigas la studon-proponon ‚Kiel nin organizi?‘ Kiel aparta eldonaĵo aperas en Dijon lia artikolo ‚Kion devas scii la esperantistaro?’
- 1913 Hector Hodler partoprenas en la 4a Kongreso de UEA, kiu okazas kadre de la 9a Universala Kongreso de Esperanto en Berno (Svislando).  
Hector Hodler kunlaboras al diversaj gazetoj, i.a. ‚Documents du Progrès’, eldonita de d-ro R. Broda. Li tradukas ‚Moralaj kaŭzoj de la militoj’ de N. Angell kaj ‚Amerikaj pejzaĝoj kaj urboj’ de C. Lesca.  
*Naskiĝo de Paulette, la komuna filino de Ferdinand Hodler kaj Valentine Godé-Darel. La familio translokiĝas al Quai du Mont-Blanc 25 en Ĝenevo.*
- 1914 *Post la subskribo de la protesto kontraŭ la bombado de la katedralo de Reims Ferdinand Hodler estas eksigita el ĉiuj germanaj artistaj organizaĵoj.*
- 1915 Hector Hodler kunlaboras al ‚Coenobium’ (Lugano) kaj ‚La Feuille’ (Ĝenevo). Kun sia patro li restadas en Montana (Valezo).  
*En januaro Valentine Godé-Darel forpasas.*
- 1914-18 Dum la unua mondmilito Hector Hodler organizas kun Hans Jakob la helpservon de UEA favore al malaperintaj esperantistoj en la militaj landoj kaj komencas skizi siajn imagojn pri la nova socio en mondo pli paca kaj pli demokratia.  
Hector Hodler verkas studaĵon pri ‚L’organisation pacifique des peuples’ (ĉ. 380 paĝoj, nepublikigita – iu parto aperis sub la titolo ‚La justice internationale et le problème de l’arbitrage’ en: ‚Les Documents du Progrès. Revue internationale’. (Lausanne), n-ro 10/1916, p. 280-96. En ‚La voix de l’humanité’, organo de la Ligo por la Defendo de la Homaro, prezidata de la aŭstra pacifisto R. Broda, aperas artikolaro de Hector Hodler pri aktualaj temoj de la milito kaj internacia politiko. Hector Hodler estas membro de la direkta komitato de tiu Ligo, en kiu membras

ankaŭ Auguste Forel. Ĉi-tema artikolaro aperas dum 1915-17 en la revuo 'Esperanto' sub la titolo 'La pacproblemo. Novaj vojoj. Milito kaj homa energio, ktp.'

Restado en Champéry kun Ferdinand.

- 1916 Hector Hodler konatiĝas kun Lina Emilie Ruch en Montreux, lia posta edzino.
- 1917 *Ferdinand Hodler pasigas la someron en Caux super Montana. Li kortuŝe leterkorespondas kun sia filo Hector. La zurika artmuzeo instalas grandan Hodler-ekspozicion.*
- 1918 La 19an de majo Ferdinand Hodler forpasas en Ĝenevo. Antaŭe li estis nomita honora civitano de Ĝenevo.  
La 14an de septembro Hector Hodler edziĝas al Emilie Ruch en Montreux.
- 1919 Pro la malbona sanstato de direktoro Hector Hodler, kiu estas elektita kiel prezidanto de UEA, sed kiu ne plu povas labori en Ĝenevo, la Centra Oficejo de UEA translokiĝas en majo al Berno, kie ĝi trovas oficejon ĉe la adreso Museumsstrasse 14 (Muzea Strato),
- 1920 La 30an de marto Hector Hodler forpasas en Leysin (VD). Li estas entombigita en la ĝeneva tombejo Saint-Georges en la familia tombo. Grandan parton de sia havaĵo li lasas al UEA, kaj ĉiuj de li hereditaj bildoj kaj pentraĵoj de Ferdinand Hodler estas donacitaj al la artmuzeoj en Berno, Ĝenevo kaj Zuriko.  
UEA trovas novan oficejo en strato Boulevard du Théâtre 12 (Teatra Bulvardo).  
De la komitato de UEA Hector Hodler estas nomita honora membro.